Pri la naciismo[1]

Jurgo Alkasaro

1. Nacio kaj burĝa revolucio

La moderna nacio aperis kun la historia supreniĝo de la burĝa klaso. Unuflanke la nacio estis la neigo de la privatismoj, de la enaj landlimoj, de la plureco de lingvoj kaj ekonomiaj mezuriloj (monunuo, pez- kaj longunuoj ktp), de la plureco de leĝaroj kaj politikaj povoj, kaj de la politika kaj militista malstabilo, kiun kunportas la feŭda reĝimo. Aliflanke la nacio estis la aŭtentika partio de kontraŭstaro al la feŭdismo: la flago, kiun levas la supreniĝanta burĝaro, por forpreni la povon al la malnovaj posedantaj klasoj, ne estis tiu el la pli granda ekonomia profito (tiu ĉi rekomendas sin mem), sed tiu el la popola regnestreco. La burĝaro estis la unua klaso el la tuta historio, kiu taŭgas mobilizi la homamasojn identigante ilin kun siaj propraj celoj: la nacio kontraŭ la monarĥio, la popolo kontraŭ la tiraneco.

La unuiĝo el tiu ĉi du faktoroj kreis la modernajn naciojn: grandajn geografiajn unuojn sub unu sola ŝtato, unu sola leĝo kaj unu sola ekonomia strukturo. La fakto, ke la ideologipolitika faktoro estas ebliginta homogenigi tiujn ĉi unuojn (la modernajn naciojn) per la fulma rapideco de la revolucioj, kredigis plurajn teoriistojn pri la naciismo kaj pri la rajto de la naciecoj al la sendependeco, ke la nacioj estas antaŭaj al la estiĝo de la kapitalismo, kaj ke tiu ĉi, sinbazante sur tiuj, kreas la nacian ŝtaton ("tiu ĉi estas la tipa okazo", diris Lenin[2], ripetante al Kaucki[3]). Antaŭ tiu ĉi eraro ni firmigu la ideon, ke la moderna nacio, tio estas la nacio, estas konstruita kune kun la nova sistemo. Ni ne preteratentu _nur pro tio, ke tiu ĉi konstruado kutimas ricevi la nomon 'unuiĝo'_, ke tiu ĉi unuiĝo estis preskaŭ ĉiam aŭtentika konstruo, pro kiu oni malaperigis lingvojn kaj tradiciajn komunumojn.

Ĉe la finiĝo de la feŭdismo la nacio iĝis la unuagrada ĉelo de la kapitalisma sistemo dum ĝia supreniĝanta fazo. Mi kredas, ke la nacifunkcioj dum tiu epoko lasas skizi sin tiele:

1. el la ekonomika vidpunkto: la nacio estas fermita unuo sen nenia ena teritorilimo (doganlimo), kiu baras la kapital- kaj varcirkuladon, sed kun potencaj eksteraj landlimoj, kiuj protektas la nacian ekonomion kontraŭ la konkurado de aliaj kapitalfrakcioj, kaj submetante la tutajn riĉaĵojn, krudaĵojn, produktunuojn, kaj laborforto- kaj varmerkaton al la sama leĝkadro.

2. el la politika vidpunkto: la nacio estas la spaco, kie la kapitalfrakcio mastranta la landon, povas kaj rajtas leĝdoni laŭ la intereso de la kapitalamasigo, intereso, kiu fariĝas la intereso de la tuta lando, la nacia intereso.

---

1 Tiu ĉi artikolo aperis ĉe la gazeto *LAUXTE* n-ro 118 (julio de la 1995a). *LAUXTE*-n eldonas: **Amika Esperanta-Rondo**. Esperanto - Cargue Sac. FR - 47470 Beauville. Francio.

2 LENIN, Vladimir Illich: "El derecho de las naciones a la autodeterminacion", (La rajto de la nacioj al la memdetermino) en *Obras Completas XXI*. Buenos Aires: Cartago 1970

3 KAUTSKY, Karl: "La nacionalidad moderna", (La moderna nacieco) en NEKONATA KOMPILANTO: *El marxismo y la cuestion nacional*. Barcelona: Avance 1977

3. el la ideologia vidpunkto: la nacio estas legitimadkadro de la privata havrajto sur la produktrimedoj kaj identigkadro de la popolo kun la "nacia" havrajto sur ĉiuj riĉaĵoj enhavataj en siaj limoj tiel, **kiel ili devas esti administrataj de efika burĝaro**. Tiel la nacio fariĝas ĉefe la legitimadkadro por la socia direktado de la burĝaro.

4. el la psikologia vidpunkto: la nacio estas la identigkadro por la formado kaj firmigado de la personeco, kiu anstataŭas la religion en la liverado de apogilo al la grega personeco.

5. el la historia vidpunkto: la nacio estas la ilo, kiu ebligas la senbarilan kapitalamasigon kaj la atingon de la sistemmatureco. Tie, se ni akceptas la modernan progreskoncepton, sin montras la progresema karaktero de la luktoj por la nacia liberigado dum la supreniĝanta kapitalismfazo: neniigi la feŭdan sistemon kaj malfermi la plej larĝan vojon al la disvolvado de la kapitalismo. Oni rimarku, ke tiuj naciismoj (apriore tiom respektindaj, kiom kiu ajn alia, se ni akceptas *nacio*n kaj *naciecon*, kiel unuagradajn konceptojn), kiuj ĉu ne detruas la feŭdismon aŭ ĉu kontraŭstaras la burĝan unuiĝon, estis konsideritaj kiel malbonaj kaj kontraŭbatalindaj naciismoj[4].

2. La nacio kaj la matura kapitalismo

Kvankam la kapitalo disvolviĝis per naciaj ĉeloj –kaj malfacile tio povus okazi alimaniere–, ĝi nur iĝas plena kaj matura, kaj sekve ĝi montras travideble sian propran trajtaron, kiam ĝi fariĝas la sola tutmonda ekonomia kadro. Dum la kapitalo estis ankoraŭ en konstitufazo, tio estas, kiam ĝi ankoraŭ kapablis sorbi antaŭkapitalismajn ekonomiojn[5], la naciaj ekonomioj antaŭeniris sen pliaj malfacilaĵoj ol la konataj ciklaj krizoj de troproduktado, kaŭzitaj de la anarĥio en la konstituiĝanta merkato. Tuj kiam la tutmonda merkato estas plene konstituita, kion montras la malapero de la ciklaj krizoj –aŭ ilia transformiĝo al konstanta krizo, kio estas la sama–, la kapitalisma sistemo atingas samtempe sian maturecon kaj la komencon de sia dekadenco. Ekde tiu ĉi momento la kapitalismo ne estas plu taŭga sorbi novajn antaŭkapitalismajn ekonomiojn, sekve ĉiuj kapitalfrakcioj, kiuj interkonkuras ĉe la sola merkato kaj kiuj naskiĝis nacie, povas nur pligrandiĝi je la malutilo de la aliaj: tiam la pluraj nacikoalicioj komencigis la ciklojn de detruado-rekonstruado-nova detruado, kiujn ni nomas tutmondaj militoj[6]. Kun la komenco de la kapitalisma dekadencfazo la nacio atingis novan karakteron: ĝi estas la kadro de enregimentiĝo por la popolo identiĝanta kun la imperiismaj interesoj de la respektivaj burĝaroj. Tio kunportas la kriminaligon de ĉiu klasa lukto kaj de ĉiu politika kontraŭstaro –estas la nacio, kiun minacas danĝero–, kaj la partoprenon en la interimperiismaj buĉadoj. La naciismo ne nur estas malprogresema, ĝi fariĝas krima.

---

4 LENIN, Vladimir Illich: "Notas criticas sobre el problema nacional", (Kritikaj rimarkoj pri la nacia problemo) en *Obras Completas XX*. Buenos Aires: Cartago 1970. NIN, Andreu: "La cuestión de las nacionalidades y el movimiento obrero revolucionario", (La laborista revolucia movado kaj la demando pri la naciecoj), *Comunismo* 37(1934). MOLINS I FABREGA, N.: "Tesis sobre las nacionalidades", (Tezoj pri la naciecoj), *Comunismo* 11(1932) vidu ĉefe la tezojn 9 kaj 15. ENGELS, Friedrich: "Was hat die Arbeiterklasse mit Polen zu tun? II", (En kio koncernas Polio al la laborista klaso? 2) en MARX ENGELS: *Werke 16* [MEW 16]. Berlin: Dietz 1971; "Brief n. 57, an Karl Kautsky, 7. Februar 1882", (Letero n-ro 57, al K. Kaucki, 1882.02.07) en *MEW 35*. Berlin: Dietz 1967.

5 LUXEMBURG, Rosa: *La acumulación de capital*. (La kapitalamasigo). Mexico: Grijalbo 1967.

6 COURANT COMMUNISTE INTERNATIONAL: *La decadence du capitalisme* (La dekadenco de la kapitalismo). CCI 1981

3. Nacia liberiĝo kaj dekadenco

a) Pri la neevoluintaj landoj la ĉefa demando estas: ĉu eblas la ekstarado de novaj kapitalismaj ekonomioj, kiu povas komparebligi la naciliberiĝan movadon en la tria mondo kun la konstituado de la eŭropaj nacioj batalantaj la feŭdismon? La du nepraj kondiĉoj por la disvolvado de nova lando estas: 1) unuagrada kapitalamasigo, pere de kiu oni povas krei novajn industriunuojn, 2) merkato, pere de kiu oni povas efektivigi la plusvaloron, tio estas aliigi al mono la produktitajn varojn.

La dua kondiĉo estas preskaŭ neebla, ĉar, por povi konkuri sukcese en la merkato, la konjekte nova nacia ekonomio devas liveri pli bonkvalitajn kaj pli malmultekostajn varojn ol tiuj liverataj de la jam establitaj ekonomioj. Tial la nova ekonomio nepre devas komenci sian vojon tie, kie la eŭropaj potencoj estas finantaj la sian. Koncerne al la eblo reindustriigi la iaman Orientan Germanion Robert Kurz[7] asertas, ke sub la nunaj kondiĉoj unu konkurtaŭga laborposteno kostas 300.000 DEM-jn, el tio li konkludtiras, ke la grandega investado bezona por la reindustriigo de la lando estas burĝekonomike malprofitodona.

Tial nur se la unua kondiĉo plenumiĝus sufiĉe, la tria mondo povus ĝui eŭropnivelan krizon. Nu kion signifas 'sufiĉe' ĉe la antaŭa frazo? Ĝi signifas, ke antaŭ ol komenci labori, oni devas amasigi tiom da kapitalo, kiom la eŭropaj nacioj estas amasigintaj dum 200 jaroj. Krom tiu ĉi heroaĵo, la triamondan kapitalamasigon malhelpas alia ekonomia faktoro: la kapitalo naskiĝis kaj kreskiĝis ĉe riĉa Eŭropo. La amasigon oni akiris _krome el la ekspluatado de la salajrata laboro_ el la sorbado de la feŭdaj riĉaĵoj pere de la merkato. Tamen ĉe la tria mondo estas nenia antaŭkapitalisma riĉaĵo _kiuj estis, tiuj estis forrabataj de la blanka koloniismo.

Sekve ĉiu pretendo similigi la triamondajn naciliberiĝajn militojn kun la konstituado de la eŭropaj nacioj dum la supreniĝanta fazo de la kapitalismo estas plene iluzia, kaj la sola funkcio, kiun ĝi povas realigi, estas la legitimado de la interimperiismaj militoj.

b) Ĉe la evoluintaj landoj la naciismo spegulas la mortlukton inter la pluraj kapitalfrakcioj: kun la saturado de la tutmonda merkato ĉiu kapitalfrakcio pretiĝas por la sola ebla kielo pluakiri profiton: detrui la merkaton kaj la ekzistantajn produktrimedojn cele de ilia rekonstruado. Grava parto de tiu ĉi pretiĝo estas la atingo de popolkonsento. Tial oni klopodos unuflanke potencigi la naciajn kaj ŝovinistajn sentojn de la popolo sub la propra influo, kaj aliparte malfortigi tiujn de la popoloj sub alia influo, favorante la subnaciismojn, kiuj subfosas la ĉefan naciismon.

Post la falo de la realsociisma kapitalo la lukto inter la usona kaj la germana kapitalfrakcioj montriĝis –kaj bedaŭrinde montriĝas– okulfrape sur la grundo de la iama Jugoslavio. Dume la neniam finiĝantaj malfacilaĵoj por la konstituado de la Eŭropa Unuiĝo ŝajnas aŭguri, ke eĉ tiu parta unuiĝo –nenio plu ol produkto de la kapitalisma konkurado, probabla pretiĝo al la tria rekta germana-usona alfronto de la jarcento– ne povos foreviti la kutiman normon, ke la nacioj unuiĝas nur sur militruinoj.

4. Naciismo kaj alternativmanko

La naciismo esprimas la neeston de alternativo al la sistemo, eĉ teoria. La sola reala eblo eliri la ĥaosan situacion, kie ni troviĝas, kaj reale defendi la popolajn interesojn –tiel perajn,

7 KURZ, Robert: *Potemkins Rueckkehr* (La reveno de Potemkin). Berlin: Tiamat 1993

kiel senperajn– estas radikala alfronto kun la sistemo de la abstrakta laboro. Tamen tio ŝajnas utopia kaj malsaĝa (se ne krima) al la nuntempa politika senteco. Tial ĉiuj saĝŝajna politika agado celas a) fortigi la grandan naciismon, tio estas tiun, kiu koincidas kun ŝtato, b) fortigi la etan naciismon, tio estas tiun de la historiaj senŝtataj naciecoj, aŭ c) ekestigi la "postnacian" naciismon[8], tio estas EEK, ktp.

Aliflanke la naciismo respondas la senperajn popolajn interesojn. Kaŭze de la neesto de alternativo al la sistemo la krizo aperas kiel nevenkebla, tial la popola fortuno fariĝas nedisigebla el la fortuno de sia kapitalfrakcio. Tiel la naciismo kaj la ksenofobio, ekzemple, estas la unua popola respondo al la senlaborkresko... ktp. Akceptite, ke la kapitalfrakcio superreganta la landon povas postvivi la endemian krizon de la sistemo, nur kondiĉe ke ĝi atingu pli da profito ol la aliaj frakcioj, la kunkulpo de la popolo kun la nacia kapitalfrakcio (salajra stopo...) estas la sola perspektivo saĝŝajna.

Konsekvence laŭ la psikologia vidpunkto la nacio kaj la nacia kulturo estas la sola objekto restanta, kun kiu la individuo povas identiĝi por firmigi sian personecon. Oni kutimas serĉi ion solidan, per kio akiri la kunsenton de la aliaj kaj strukturigi la propran karakteron; kiam la nuntempo estas malkuraĝanta kaj la estonto tenebra, oni povas celi nur al la pasinto.

Sekve ni povas konkludi, ke

1. la nacio estas fariĝinta senfutura anakronismo, kiu povas servi nur al reakciaj celoj, unuflanke ĉar la tendenco de la teknika kaj ekonomia disvolvado estas la tutmondiĝo, aliflanke ĉar ne ekzistas "partikularaj" elirejoj el la sistemstruktura krizo de la tutmonda kapitalo.
2. la naciismo, krom labori por tutmondmilita krizeliro, malhelpas ĉiun seriozan kaj klarpensan temigon pri la realaj problemoj de nia socio.
3. la naciismo ne povas esti efike kontraŭbatalata sen la kontraŭstaro de historia alternativo al la kapitalismo.

8 HABERMAS, Juergen: "Staatsbürgerschaft und nationale Identität", (Civitaneco kaj nacia idento) en *Faktizität und Geltung*. Frankfurt: Suhrkamp 1990